
La Hodiaŭa Ĵurnalo

2017-12-13 n-ro 384

# Oficiala ceremonio pri Zamenhof ĉe Unesko en Parizo




Orienta Ukrainio: plia vintro da konflikto

Brita ĉefministro emfazas kondiĉan pagon por foriro el EU

Fizikistoj eltrovis novan tipon de materio: la ekscitonon

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin [Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Farita per: Scribus

Orienta Ukrainio: plia vintro da konflikto
*Pli ol 10 000 mortintoj p. 03*

Oficiala ceremonio pri Zamenhof ĉe Unesko en Parizo
*Sidejo de Unesko en Parizo p. 05*

Brita ĉefministro emfazas kondiĉan pagon por foriro el EU
*La du flankoj devas atingi interkonsenton pri komerco p. 05*

Fizikistoj eltrovis novan tipon de materio: la ekscitonon
*Elpensita antaŭ 50 jaroj p. 06*

Unua interkontinenta radiokonekto
*La 12-an de decembro 1901 p. 07*

Elefanto atakis aŭtobuson kaj kamionon sur veturilvojo
*Sudokcidenta landlimo de Ĉinlando p. 08*

Hodiaŭe
*Heinrich Heine; kaj Neŭraminidaso p. 08*

Ankaŭ lingvistoj estas homoj
*Informado direktita al lingvistoj p. 09*

Ĝemelidoj akompanos nin dum la Zamenhofa Tago!
*Meteorfluoj p. 11*

# Orienta Ukrainio: plia vintro da konflikto

Pli ol 10 000 mortintoj, pli ol miliono kaj duono da delokitoj en daŭro de preskaŭ kvar jaroj: tio estas la rezulto de la milito oriente de Ukrainio, kiu plu kaŭzas viktimojn hodiaŭ. Nova vintro komenciĝas laŭlonge de la frontlinio. Ne-Registaraj Organizaĵoj apogitaj de Eŭropa Unio, helpas la surlokajn loĝantojn.



Jevdokja, loĝantino de Pervomajsko, oriente de Ukrainio, diras:

«Kelkafoje, nia vilaĝo estas pripafata meze de la tago, ni scias nek kiu pafas, nek de kie venas la pafoj».

**Jen kelkaj donitaĵoj ciferaj pri tiu daŭra konflikto**

De preskaŭ kvar jaroj, la milito en Orienta Ukrainio kaŭzis 10 000 mortintojn, inter kiuj preskaŭ 3 000 civilulojn, laŭ la Misio pri homaj rajtoj de UN en Ukrainio.

Laŭ la Alta Komisaro de la Unuiĝintaj Nacioj pri la rifuĝintoj, kaj la Ministrejo de la sociala politiko en Ukrainio, pli ol miliono kaj duono da personoj estis devigitaj forlasi sian hejmon, kaj pli ol miliono fuĝis eksterlanden.

Hodiaŭ, la Buroo de kunordigado de la humanitaraj aferoj de UN, taksas je kvar milionoj la nombron da ukrainanoj, kiuj bezonas humanitaran helpon en la lando.

Ĉi-jare, oriente de Ukrainio, 400 civiluloj estis mortigitaj aŭ vunditaj laŭlonge de la frontlinio, kiu apartigas la areojn kontrolatajn de la ukrainiaj fortoj, disde la regionoj regataj de la por-rusiaj separatismuloj. La rezulto estas pli maltrankviliga ol pasintjare

**Riparo de la domoj kaj hejtado**

Malgraŭ la batal-interrompo, artileria pafado okazas ĉiutage. Ni aŭdis ilin, kiam ni estis en Pervomajsko, en la hejmo de Jevdokja, 80-jaraĝa. Ŝia domo, situanta tri kilometrojn for de la frontlinio, estis tuŝita du fojojn. «Iam, bombo falis sur la vojo dumtage, rakontas Jevdokja. Tri fenestroj estis elŝiritaj pro la pafblovo; tiam, mi staris en la hejmo», ŝi eksplikas.

Jevdokja vivas de du jaroj en sia domo kun damaĝita tegmento. *People in Need* venis por helpi. Tiu ĉeĥa NRO, financata de Eŭropa Unio riparis kvardek domojn, proksime de la vintro, ĉefe por laboroj je averaĝa graveco, koncerne tegmentojn kaj fenestrojn.

«En kelkaj kazoj, ni kontentiĝas liveri necesan materialon, - precizigas Sergej SAJENKO, direktoro de la programo por loĝejoj ene de la asocio. Ni ankaŭ donacas monon, ke la loĝantoj mem povu aĉeti materialojn. Sed plejofte, ĉar

multaj personoj vivantaj sur la frontlinio estas vundeblaj, ili ne povas ripari solaj: ni do donas la materialojn, trovas surlokajn laboristojn, kaj pripagas ilin», li diris.

**Daŭra danĝero**

Preskaŭ ĉiu dua loĝanto forlasis la vilaĝon de post 2014, sed ili estas pli kaj pli multnombraj, kiuj revenas. Hodiaŭ, 1 500 personoj, ĉefe maljunaj aŭ sen laboro, rekonstruas ion meze de forlasitaj domoj. Estas danĝere proksimiĝi pro ebla ĉeesto de minoj kaj neeksploditaj municioj.

«Ni spertas militan tempon, substrekis Jevdokja. Kelkfoje, nia vilaĝo estas mitralata dumtage, kaj neniu komprenas: ni scias nek kiu pafas, nek de kie, ŝi daŭrigas. Nokte, tio estas eĉ pli timiga», ŝi konfidas.

Ni iru suden, ĉirkaŭ *Marinka*, apud Donecko. Tio estas unu el la plej riskaj lokoj, laŭlonge de la frontlinio, senĉese bombataj. Vintro malfortigas la loĝantaron, kiu jam malfacile vivtenas sin. Tutaj sektoroj de tiu urbo ne plu ricevas gason de post 2014.

«Hodiaŭ, ni kalkulis 250 familiojn, kiuj bezonas tujan helpon, precizigas Andrew Meyer, direktoro de la programo ene de *"People in Need"*. Laŭ ni, unu el la manieroj daŭre adapti iliajn loĝejojn al la vintro, konsistas en liverado de ligno-hejtiloj: ni instalas ilin kaj alportas lignon, tiel ke la personoj povu funkciigi ilin dum la tuta vintro», li diras.

**Bezono de hejtado kaj nutraĵoj**

La organizaĵo sukcesis helpi duonon el la loĝantoj de *Marika*. Ĉiuj familioj, kiel tiu de Vitalij ricevis sufiĉe da ligno por trapasigi la vintron. Tiu subteno estas bonvena por Vitalij Vladimirovič, eks-ministo, kiu jam pasintvintre ne sukcesis trovis karbon.

«Tuj post la komenciĝo de la milito, fiksa landlimo ne ekzistis kiel hodiaŭ; estis do pli facile havigi al si karbon ambaŭflanke, kaj dank' al la homoj, kiujn mi konis en la mino, mi povis akiri karbon de tempo al tempo, kvankam mi ne plu laboris tie», li memoras.

La humanitara situacio ĝenerale pligraviĝis, laŭ la NROj. Loĝantoj revenas hejmen, sed sen stabila mongajno. La varoj ne cirkuladas libere, kaj la prezoj altiĝas. Ni demandis la reprezentanton de la servo de la Eŭropa Unio pri humanitara helpo, pri la evoluado de la helpo du la lastaj jaroj:


«De jaro kaj duono, ĉar la frontlinio estas stabiligita, ni prizorgas specife tiujn, kiuj vivas en la areoj tuŝataj de la konflikto, insistas Mathias Eick. Kompreneble, la defio estas, ke ni povas eniri en la areojn kontrolatajn de la registaro. Sed kontakti la loĝantojn de la areoj nekontrolataj de la registaro, estas multe pli malfacile por ni», li substrekas.

Por la loĝantoj, kiel Jevdokja, kiuj vivas laŭlonge de la frontlinio, ankaŭ la manko de nutraĵoj plu estas problemo: laŭ "*People in Need*", la nivelo de nutraĵa malsekureco duobliĝis en daŭro de jaro.

Neniam Milito Inter Ni

# Oficiala ceremonio pri Zamenhof ĉe Unesko en Parizo

Hodiaŭ [11 dec 2017] matene okazis oficiala ceremonio en la sidejo de Unesko en Parizo, honore de la Zamenhof-jaro. La ceremonion iniciatis la pola delegacio, gvidata de ambasadorino Krystyna Zurek.




Antaŭ multnombra publiko nur parte esperantlingva, en ĉeesto de tri gefamilianoj de Zamenhof (lia nepo Louis Christophe, ties filino Maryse Wanda kaj nepo Pierre), alparolis sep prelegantoj: Sébastien Moret (Svislando), Jean-Claude Lescure (Francio), Guilherme Fians (Brazilo), Chuck Smith (Usono), Trezoro Huang Yinbao [黄银宝 Huáng Yínbăo] (Popola Ĉinio [Ĉina Popola Respubliko]), Giorgio Novello (Italio). Funkciis samtempa interpretado, inkluzive de nia lingvo.

En la fokuso de la tago estis ankaŭ la esperanto-varianto de la revuo "*Kuriero de Unesko*", redaktata de s-ro Trezoro Huang Yinbao.

Dum la enkondukaj vortoj s-ino Renée Triolle, ĉefdelegito de Universala Esperanto-Asocio en Francio, laŭtlegis saluton de la direktorino de la Monda Kultura Heredaĵo de Unesko, kiu mem lernis esperanton denaske.

HeKo 667 5-A, 11 dec 17

# Brita ĉefministro emfazas kondiĉan pagon por foriro el EU


Brita ĉefministro Theresa May [təˈreɪzə (aŭ təˈriːzə) ˈmeɪ] diris lunde [11 dec 2017], ke Britio pagos eble 35 miliardojn ĝis 39 miliardojn da sterlingaj pundoj por sia foriro el la Eŭropa Unio kun la kondiĉo, ke la du flankoj devas atingi interkonsenton pri komerco.



May faris la rimarkojn en parolado al la Malsupra Ĉambro de la brita parlamento. Ŝi diris, ke Britio rifuzos pagi por la foriro, se la du flankoj ne povos akordiĝi pri komerca partnereco. Ŝi asertis, ke Britio tute kapablas orde kaj plate foriri el la EU.

La EU anoncis la 8-an de decembro, ke post 6-monata penado, la unua fazo de la intertraktado inter la EU kaj Britio akiris sufiĉan progreson, kaj la du flankoj komencos la duan fazon, kiu fokusiĝos pri komercaj rilatoj inter la du flankoj post la foriro.

Yu
Ĉina Radio Internacia



# Fizikistoj eltrovis novan tipon de materio: la ekscitonon

Ekscitono ŝajnas nomo de iu kemia substanco inventita de bildliteratura revuo.

Tamen ĝi estas reala scienca nomo, elpensita antaŭ 50 jaroj, por priskribi novan tipon de materio, kiun la sciencistoj kredis ekzisti, sed ne sukcesis pruvi ĝian ekziston ĝis nun.

Fizikistoj de la Universitato de Ilinojso anoncis, ke nun estas eble elmontri, ke la ekscitono efektive ekzistas, opiniante, ke tiu eltrovo havas "kosman gravecon".

En artikolo publikigita la 8-an de decembro [2017], la esploristoj rivelis, kiel finfine ili sukcesis pruvi la ekziston de tiu nova tipo de materio, tiel povante respondi kelkajn delongajn demandojn, studinte kristalojn el metalo per nova speciala tekniko.

"La ekscitonoj estas partikloj formataj el stranga kvantuma mekanika kombinaĵo, tio estas, el elektro, kiu eskapis, kaj el la truo, kiun ĝi lasis", skribis Siv SCHWINK, la proparolanto de la Departemento pri Fiziko de la Universitato de Ilinojso.

Tamen, kompreni, kiel ekzistas la ekscitono, ne estas tiel simple, kiel labori pri la strukturoj de molekuloj kaj atomoj, kiuj estas videblaj per la modeloj de bulo kaj fadeno en la laboratorioj pri kemio de la mezgradaj lernejoj, aŭ per la diagramoj de elektronika ringo ĉirkaŭ la atomoj.

La ekscitono estas submetebla al la reguloj de la stranga kaj mirinda mondo de la Kvantuma Fiziko, kie aferoj, kiel la enigmaj "probablecaj ondoj" povas ekzisti simultane kiel ondoj kaj partikloj, defiante la ordinaran homan logikon kaj la neŭtonan fizikon.

Fonto: epochtimes.com.br

Josenilton
jotakaeme.blogspot.com

# Unua interkontinenta radiokonekto

La 12-an de decembro 1901 la itala sciencisto kaj entreprenisto Guglielmo MARCONI (1874-1937) starigis, en la stacio *Poldhu* en Kornvalo (Anglio), la unuan interkontinentan radio-konekton, elsendante al distanco de 4 000 kilometroj *(St. John's, Newfoundland*, Novlando/ Teronova, Kanado) tri mallongajn sparkojn, respondajn al la tri punktoj de litero S de la MORSE-alfabeto.



Temis pri la unua radio-elsendo, kiel memorigas la bronza ŝildo almetita al la monumento starigita sur la loko, kie iam situis la sendostacio *Poldhu* (fermita en 1934, kaj malkonstruita): Kiam la stacio *Poldhu* estis konstruiita en 1900, radiotelegrafio estis en sia infanaĝo; kiam ĝi estis malkonstruita en 1935, la senfadena telegrafo estis firmiĝinta por la teraj, maraj kaj aeraj komunikoj, por la serĉado de pozicio, por la radiosendado kaj televido.

En la jaroj post 1901, la nova rimedo plenumis eksterordinarajn servojn, savante homajn vivojn kaj estis istrumento de alproksimigo inter la popoloj; kiel substrekas la filatela bulteno de la Itala Poŝto (subskribita de Prof. Gian Carlo CORAZZA, Prezidanto de la Fondaĵo Guglielmo MARCONI de Pontecchio MARCONI – Bolonjo), eldonita en 1981 pri la poŝtkarto memoriganta la unuan konekton: En sia tuta ekzisto Guglielmo MARCONI neniam laciĝis substreki, ke Radio estas potencega rimedo por alporti la pacon inter la popoloj. Ĉi tiu lia mesaĝo atingis ĉiujn homojn de lia tempo, kiuj ne nur kundividis ĝin, sed ankaŭ ĝin emfazis en la momento de lia morto en la plej "bru-sensacia" maniero: silentigante dum mallonga tempospaco ĉiujn radiostaciojn de la mondo.

**Lia moŝto MARCONI por Universala Lingvo**

"Dum sia ĵusa vizito al Japanujo, Lia Ekscelenca Moŝto MARCONI partoprenis en bankedo, proponita honore al li de la aŭoritatuloj kaj eminentuloj de Tokio. Li parolis en la angla, kaj inter la temoj mallonge pritraktitaj estis la ebleco de universala lingvo, eventuale naskiĝonta helpe de Radio.

«Ĝuste nun okazas al mi» – diris Lia Ekscelenca Moŝto MARCONI, «ke pro mia nescio de la japana mi estas devigata alparoli vin en la angla. Kiu povas diri ĉu, pro la konstanta kaj ĉiam kreskanta uzo de radiokomunikoj, iam oni trovos novan rimedon por esprimi siajn pensojn, kiun ĉiuj povos adopti kiel universalan lingvon? Kia plejbona kronigo de la radiaj progresoj, verdire, se, samkiel la elektraj ondoj ĉirkaŭiras la mondon, la simboloj, kiujn ili kutimas ĉien disvastigi utilos unuigi ĉiujn popolojn en unu solan blokon de interkompreniĝo kaj bonvolo! Tio povas aspekti pli vizio de poeto ol opinio de sciencisto: sed la scienco ne estas tute sen poezio, kaj ĝi estas tre taŭge helpata de la imagopovo. Aliflanke, mi opinias, ke mi rajtas aserti, sekve de ĉiuj eksperimentoj faritaj pere de radio, ke la plej grandaj ŝancoj estas antaŭ, kaj ne malantaŭ ni»". (L'Esperanto" 1934-1/2 - traduko el  Radio Roma-Esperanto)

Antonio DE SALVO
Esperanto-vivo

# Elefanto atakis aŭtobuson kaj kamionon sur veturilvojo

Junano estas provinco, kiu situas ĉe la sudokcidenta landlimo de Ĉinlando. Tie lastsabate la 9-an de decembro iu elefanto atakis aŭtobuson kaj kamionon sur veturilvojo.



Filmite de loĝantoj kaj forstumaj aŭtoritatojtiu okazaĵo kaŭzis nur materialajn difektojn, malgraŭ tio, ke la stiristo de la aŭtobuso restis interne de la veturilo.

Por kontrolado de la agado de tiu besto, kies ĉeesto en tiu montata regiono estas ofte rimarkata, estis nomitaj ok observantoj.

Jen la koncerna filmeto (vidu).

Laŭ Vikipedio: Elefanto estas komuna nomo por membroj de la familio elefantedoj. Ili estas la nun plej grandaj surteraj mamuloj. Ili vivas en Afriko (Loxodonta) kaj Azio (Elephas). Ili havas longan fortan rostron kaj modifiĝintan incizivon, nomatan dentego aŭ pikdento (vidu eburo).

Paulo Cesar Pires
esperanto.blog




## Heinrich Heine

**Heinrich Heine** [hajnriĥ hajne]['haɪnʁɪç 'haɪnə] **, en Esperanto Henriko Hejno (naskiĝis la 13an de decembro 1797 en *Düsseldorf*, mortis la 17an de februaro 1856 en Parizo), estis germanlingva poeto kaj ĵurnalisto.**

**En Esperanto aperis pluraj tradukoj.**

**Vikipedio**



## Bildo de la tago

**Tridimensia bildigo de la molekulo de neŭraminidaso.**

**Vikipedio**

# Ankaŭ lingvistoj estas homoj

Indas dediĉi energion al informado direktita al lingvistoj, ĉar ili estas la kutimaj fakuloj, al kiuj turniĝas ĵurnalistoj, kiam ili volas verki pri Esperanto. Krome ilin demandas politikistoj, kiam ĉi tiujn oni alparolas pri Esperanto. Tion opinias Renato CORSETTI, kiu jam en la 1970-aj jaroj ekokupiĝis pri tia informado en Italio.



Ankaŭ lingvistoj estas homoj. Kaj kiel homoj ili estas influataj tre profunde de la ĉirkaŭa medio kaj de la ideoj de sia tempo. Tio okazas ankaŭ en Italujo. Kiam ekaperis Esperanto, italaj lingvistoj estis sub la forta influo de la germanaj novgramatikistoj kaj ĉiuokaze de la idealisma lingvistiko de la 19-a jarcento. Ili ne povis aprobi Esperanton kaj ne aprobis ĝin. Tiu pens-maniero eĉ havis sian negativan influon tra la artikoloj de GRAMSCI, politikisto kaj ĵurnalisto, kiu skribis malfavore al Esperanto post studoj en la universitato de Torino, kiu funkciis ankoraŭ laŭ la romantikaj ideoj pri lingvoj.

Bonŝance aperis tute sendepende juna parolanto de Esperanto, Bruno MIGLIORINI, kiu iĝis fama itala lingvisto, kvankam en la faŝisma epoko oni konsilis al li, laŭ verŝajna onidiro, ke li forgesu pri Esperanto, se li volas karieri. Fakte li malaperis el la komunumo.

En la komenco de la 70-aj jaroj de la pasinta jarcento bolis debatoj pri ĉio en Italujo kaj ankaŭ pri Esperanto. Ĝenerale lingvistoj taksis ĝin malpozitive pro tradicio de malpozitiveco de unu jarcento. Tiam komenciĝis kontaktoj inter junaj italaj parolantoj de Esperanto kaj junaj lingvistoj, kiuj pretis aŭskulti ideologiajn pravigojn pri la kontraŭimperiisma valoro de la internacia lingvo. Pro subteno de ili tiam aperis mia libro, *Lingua e Politica* (Lingvo kaj politiko), kiu havis kelkajn legantojn en la lingvista medio.

La kontaktoj daŭris dum jaroj. Intertempe en la itala panoramo aperis sukcesa lingvisto, Fabrizio PENNACCHIETTI, kiu instruis ŝemidajn lingvojn en pluraj universitatoj, kaj kies esperantisteco estis konata de liaj kolegoj. Pro debatoj pri la lingvo de la tiam kreota Eŭropo estis eble ligi kontaktojn kun alia lingvisto, Tullio DE MAURO, lastatempe mortinta, kies influo en la progresema intelektularo estis granda. Li estis mallonge ankaŭ ministro pri instruado en maldekstra registaro. Per lia helpo oni aranĝis debatojn pri Esperanto por lingvistoj en la universitato de Romo. Kaj li ankaŭ verkis enkondukon al la reeldonita lernolibro pri Esperanto de Bruno MIGLIORINI.

Tio igis aliajn lingvistojn iom repensi pri Esperanto: Se DE MAURO favoras ĝin, prefere ni estu prudentaj.

Iam en la fino de la 80-aj jaroj mi iĝis membro de la Itala asocio de lingvistoj, kies animo estis la sama DE MAURO, kaj tiam mi ekhavis la adresaron de ĉiuj membroj. Temis pri ankoraŭ preskaŭ pure papera epoko antaŭ la disvastiĝo de la Reto. Per la kunlaboro de aliaj parolantoj de Esperanto – mi volas memorigi nur pri Umberto BROCCATELLI – ni starigis adresaron de lingvistoj, kiuj komencis ricevi la itallingvajn

numerojn de la itala revuo de Esperanto, en kiuj estis sciencaj pritraktoj pri Esperanto aŭ raportoj pri eksperimenta instruado de Esperanto en lernejoj. Tia agado de sendado de informoj en presita formo daŭris jarojn.

Laŭgrade la malfavoraj komentoj pri Esperanto fare de lingvistoj malmultiĝis. Restis, kompreneble, la malfavoraj komentoj de ĵurnalistoj, ĉiufoje kiam oni menciis ĝin kunlige kun la estonta lingvo de Eŭropo.

Sed la vera fina bato al la malpozitiva pritrakto pri Esperanto en lingvistaj rondoj venis ne pro rekta merito de nia kampanjo sed pro la libro de Umberto Eco pri la serĉo de la perfekta lingvo en la eŭropa kulturo, kiu aperis en 1993. Ĉar la prestiĝo de Umberto Eco estis ankoraŭ pli granda ol tiu de Tullio De Mauro, efektive la lingvistoj akiris ankoraŭ pli grandan prudenton pri Esperanto. Kiel mi diris en la titolo, ankaŭ lingvistoj estas homoj, kaj ili ne ŝatas kontraŭdiri homojn pli famajn, kaj volonte sekvas la fluon.

La agado de regula informado al lingvistoj daŭris ankoraŭ en la komenco de la nuna jarcento ĝis 2010 proksimume, kiam pro akcidento la adresaro ne plu funkciis kaj neniu pretis rekonstrui ĝin. Intertempe oni aranĝis kunvenojn de lingvistoj, unu ĝuste en 2010 celebre al la 100-a datreveno de Itala Esperanto-Federacio kunlabore kun la Akademio de la itala lingvo, *Accademia della Crusca*.

Nuntempe Esperanto estas memkomprenebla aĵo inter italaj lingvistoj. Oni instruas ĝin en la universitato de Torino (persona sukceso de Fabrizio Pennacchietti estis la starigo de la kurso, kiun nun instruas Federico Gobbo), kaj pluraj priesperantaj agadoj okazas en la universitato de *Parma*.

Ĉu tio signifas, ke Esperanto gajnis en Italujo? Tute ne. Simple ne aperas atakoj al ĝi fare de lingvistoj, sed jes aperas atakoj al ĝi fare de ĵurnalistoj kaj aliaj, kaj la nombro de lernantoj de Esperanto apenaŭ estas influata de lingvistoj. Jes estas multaj disertacioj pri Esperanto, kaj de tempo al tempo iuj studentoj lernas pro mencioj en la universitataj lernolibroj pri lingvistiko.

Ĉu indas sisteme informi lingvistojn ankaŭ en aliaj landoj? Ĉu tio vere influos tion, kion ili diros aŭ ne diros pri Esperanto? La itala sperto indikas, ke jes. Sed eble la maniero aranĝi la kampanjon nun estus tute alia pro la nova reta mondo.

Informado al lingvistoj gravas, ĉar ili estas la kutimaj fakuloj, al kiuj turniĝas ĵurnalistoj, kiam ili volas verki pri Esperanto. Krome ilin demandas politikistoj, kiam ĉi tiujn oni alparolas pri Esperanto. Do estas bone, se la plimulto de ĉiuj lingvistoj, kaj ne nur la specialistoj, jam estas informitaj pri la realo de Esperanto kaj Esperantujo.

Estas tre bele, ke nun en Italio la lingvistoj plejparte scias pri la realo de Esperanto – sed verŝajne necesos ankoraŭ informi multajn lingvistojn en aliaj landoj. Kiel ni povos aranĝi tiajn kampanjojn?

Necesos krome zorgi, ke la akirita informo-nivelo restu. Por tio bonas plu regule sendi al multaj lingvistoj aktualajn informojn pri Esperanto el iom scienca vidpunkto.

Renato Corsetti
Libera Folio




# Ĝemelidoj akompanos nin dum la Zamenhofa Tago!

Ĝemelidoj estas unu el la plej atendindaj meteorfluoj ĉiujare. Ilia aktiva periodo daŭras proksimume de la 7-a ĝis la 17-a de decembro. Ĉi-jare, la kulmino estos je 14:30 [UTC?] de la 14-a de decembro, kaj la zenita hora kvanto (ZHR) estos ĉirkaŭ 120, preskaŭ same kiel en antaŭaj jaroj.

Laŭ la konigo de astronomoj, la plej bona observa tempo de Ĝemelidoj ĉi-jare estos de vespero de la 13-a de decembro ĝis tagiĝo de la 14-a de decembro. Dumnokte, la nombro de meteoroj atingos pohore 80-100. En la periodo de la nokto de la 12-a ĝis la mateno de la 13-a de decembro, la nombro estos 30-40, ankaŭ indos zorga atendado por sukcesa observado. En la antaŭa duona nokto de la 14-a de decembro, post pasado de la maksimumo, kvankam mallumaj meteoroj malmultiĝos, tamen estos lumaj meteoroj aŭ eĉ bolidoj, kaj ili same estos atendindaj.

La ĉi-jaraj Ĝemelidoj estas konsiderataj kiel "la plej bonaj", ĉar ili ne estos "minacataj" de la luno kiel aliaj, pli fruaj meteoroj de tiu ĉi jaro.

Ĝi ankaŭ alportos al ni kroman bonŝancon: la rok-astro 3200 Faetono.

Registroj en la lastaj jaroj montras ankaŭ, ke la ĉi-jaraj meteoroj havos novan distribuon, la malgrandaj kaj mallumaj meteoroj eble pli frue aperas ol la maksimumo je unu tago. Sed ili estas pli malfacile observeblaj de la homaj okuloj pro la mallumeco.

La 15-an de decembro estos la Zamenhofa Tago, la plej grava memortago en Esperantujo. Ĝemelidoj akompanos nin pasigi la tagon. Do ni, esperantistoj, ne forgesu esprimi nian deziron!

Xie Ruifeng
El Popola Ĉinio